3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, ti al Esperanto estas „nenies propraĵo“, nek en rilato materiala, nek en rilato morala. Materiala mastro de tiu ĉi lin gvo

который могъ бы служить въ качествѣ примиряющаго языка публичныхъ учреждений въ тѣхъ странахъ, гдѣ различныя націи борются между собою изъ-за языка, и на которомъ могли бы появляться тѣ сочиненія, которыя имѣютъ одинаковый интересъ для всѣхъ народовъ. Всякая другая идея или надежда, которую тотъ или другой Эсперантистъ связываетъ съ Эсперантизмомъ, есть его чисто частное дѣло, за которое Эсперантизмъ не отвѣчаетъ.

2. Такъ какъ въ настоящее время ни одинъ изслѣдователь во всемъ мірѣ уже не сомнѣвается въ томъ, что международнымъ языкомъ можетъ быть только искусственный языкъ, и такъ какъ многочисленныя попытки, дѣлавшіяся въ продолженіе послѣднихъ двухъ столѣтій, всѣ представляютъ только теоретическіе проекты, а языкомъ дѣйствительно законченнымъ, все сторонне испытаннымъ и во всѣхъ отношеніяхъ наиболѣе годнымъ оказался только одинъ языкъ Эсперанто, поэтому друзья идеи международного языка, сознавая, что теоретическіе споры не приведутъ ни къ чему, и что цѣль можетъ быть достигнута только путемъ практической работы, уже давно всѣ сгруппировались вокругъ единственнаго языка Эсперанто и работаютъ для его распространенія и обогащенія его литературы.

3. Такъ какъ авторъ языка Эсперанто въ самомъ началѣ отказался развѣ навсегда отъ всѣхъ личныхъ правъ и привилегій по отношенію къ этому языку, то Эсперанто не составляетъ „ничьей собственности“, ни въ отношеніи матеріальномъ, ни въ отношеніи моральномъ. Матеріальнымъ хозяиномъ

estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniuj aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute privatan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniuj havas la rajton fari eĉ la plej malgrandan ŝanĝon. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

этого языка является весь миръ, и каждый желающий может издавать на или объ этомъ языкѣ всякія сочиненія, какія онъ желаетъ, и пользоваться языкомъ для всевозможныхъ цѣлей.

4. Эсперанто не имѣетъ никакого личнаго законодателя и не зависитъ ни отъ какого отдѣльнаго чловѣка. Всѣ мнѣнія и сочиненія творца Эсперанто имѣютъ, подобно мнѣніямъ и сочиненіямъ всякаго другаго Эсперантиста, характеръ абсолютно частный. Единственнымъ разъ навсегда обязательнымъ для всѣхъ Эсперантистовъ основаніемъ языка Эсперанто является небольшое сочиненіе „Fundamento de Esperanto“, въ которомъ никто не имѣетъ права сдѣлать даже самое маленькое измѣненіе*). Всякую идею, которая не можетъ быть удобно выражена посредствомъ того матеріала, который находится въ „Fundamento de Esperanto“, каждый Эсперантистъ имѣетъ право выразить такимъ образомъ, какой онъ находитъ самымъ подходящимъ, точно такъ же, какъ дѣлается во всякомъ другомъ языкѣ. Но въ цѣляхъ полнаго единства языка всѣмъ Эсперантистамъ рекомендуется подражать какъ можно больше тому стилю, который находится въ сочиненіяхъ творца Эсперанто.

5. Эсперантистомъ называется всякое лицо, знающее и употребляющее языкъ Эсперанто совершенно безразлично, для какихъ цѣлей оно его употребляетъ. Принадлежность къ какому-нибудь активному Обществу Эсперантистовъ каждому Эсперантисту рекомендуется, но не является обязательной.

*) „Fundamento de Esperanto“ содержитъ: 1) предисловіе д-ра Л. М. Заменгофа. 2) 16 правилъ грамматики Эсперанто, 3) „Ekzercaro“ (сборникъ упражненій) д-ра Заменгофа, 4) „Universala Vortaro“ (Универсальный Словарь) его-же. *Прим. ред.*

II. Malgrandaj diversaĵoj Kaj anekdotoj.

Leciono de grandanimeco. — La angla reĝo Karlo II ricevis la tronon parte dank' al lordo Shaftesbury (Ŝeftsbjuri). Sed baldaŭ la reĝo forgesis la servojn de la lordo kaj nenion faris por altigi lin inter ĉiuj aliaj korteganoj. Unu fojon, kiam la reĝo estis en sia palaco kun la lordo, oni raportis pri alveno de deputatoj de la Skotlanda (Шотландский) nobelaro. Ĉar al Karlo tedis ĉiuj similaj petoj kaj prezentoj, li diris al lordo Shaftesbury:

— Ni interŝanĝu hodiaŭ niajn lokojn: vi ludos la rolon de la reĝo, kaj mi estos anstataŭ vi.

Kiam aperis la deputataro, la lordo Shaftesbury sin turnis al ĝi, dirante:

— Sinjoroj, ne miru, ke mi ankoraŭ nenion faris por vi. Jen estas lordo Shaftesbury, — kaj la parolanto montris la veran reĝon, — dank' al kiu mi fariĝis reĝo kaj al kiu mi ne donis ankoraŭ ian eĉ la plej malgrandan signon de dankeco.

Turkaj proverboj. — Por maldiligentulo ĉiu tago estas Bajram. — Blanka hundo kaj nigra hundo: ambaŭ estas hundoj. — Ĉiu ploro havas sian ridon. — Se oni eĉ detranĉas la nazon kaj la orelojn de azeno, tamen ĝi restas azeno. — Kio estas donata prunte, tio foriras kun rido kaj revenas kun ploro. — Lango pli mortigas ol glavo. — Hodiaŭa ovo estas pli bona ol morgaŭa kokino. — Manĝu kaj trinku kun via amiko, sed ne faru negocon kun li.

Salomona juĝo. — En lernejo por knabinoj en unu malgranda bohema urbo okazis, ke du lernantinoj malpacigiĝis, disputante, al kiu el ili apartenas

ŝtrumpo, jam duone trikita; ĉiu el la knabinoj diris, ke la ŝtrumpo estas Sia. Ili petis tiam la instruistinojn, ke ŝi juĝu ilian malkonsenton. Ĉar neniu el ceteraj lernantinoj povis kiarigi, kies estas la ŝtrumpo, la instruistino decidis tiel:

— Mi volas kontentigi ambaŭ vin, — diris Ŝi al la knabinoj, — kaj ĉar mi ne scias, kiu juste posedis la ŝtrumpon, mi disprenos la trikaĵon kaj dividos inter vi la fadenon. Nu, ĉu vi konsentas?

La unua knabino konsentis, la dua ekploris. Tiam la instruistino donis la tutan trikaĵon al la dua knabino.

Ĝentileco en Hinujo (Китай). — Oni scias bone pri „ĥinaj ceremonioj» kaj pri neordinara ekstera ĝentileco de ĥinoj. Ofte tio ĉi estas simila preskaŭ al ironio. Kiam aŭtoro alsendas en redakcion de gazeto nepresindan manuskripton, tiam la redakcio respondas al li:

„Ni legis vian verkon kun grandega plezuro. Ni ĵuras, ke neniam ĝis nun ni legis tian bonegan verkon. Se ni presus ĝin Lia Imperiestra Moŝto nepre ordonas, ke ni prenu ĝin kiel modelon kaj neniam presadu ion malpli bonan. Sed ĉar io egala al via belega verko certe ne aperos dum dek mil jaroj, ni, tremante, resendas al vi vian manuskripton kaj dek mil fojojn petas vian pardonon...“

El la historio de gazeto. — La unua efektive politika gazeto estis fondita de Petro Rousseau (Russó) en urbo Liege (Lieĵ) en Belgujo en la jaro 1756. Ĝia titolo estis: *Journal Encyclopedique*. Tiu ĉi gazeto eliradis unu fojon en ĉiu semajno kaj havis en la nombro de siaj kunlaborantoj la plej glorajn homojn de la XVIII-a jarcento: Voltaire, J. J. Rous-

seau, D'Exiles, Prevost, D'Alembert, Diderot, Mirabeau kaj aliaj. — La unua ĉiutaga gazeto estis la ĵurnalo La Feuille sans titre (La Folio sen titolo), sed ĝia vivo estis mallonga.

El la statistiko de l'uzado de lingvoj. — En la poŝta kongreso en Vaŝingtono estis montrite per oficialaj ciferoj, ke du trionoj da ĉiuj leteroj, pasantaj tra ĉiuj poŝtaj stacioj de la tuta tera globo, estas skribataj en la angla lingvo. Tamen, oni parolas en la angla lingvo pli malmulte ol skribas. El kvincent milionoj da homoj, kiuj uzas unu el dek aŭ dekdu eŭropaj lingvoj, nur 125 milionoj parolas en la angla lingvo. Poste sekvas la lingvoj: rusa, 90 milionoj; germana, 75 milionoj; franca, 55 milionoj; hispana, 45 milionoj; itala, 35 milionoj; portugala, 12 milionoj; hungara, 10 milionoj kaj tiel plu.

Sur la strato. — Ni transiru sur la alian flankon. Tie ĉi iras Johano, kiun mi ne volas renkonti, ĉar mi ŝuldas al li kvin frankojn.

— Ho, ni povas resti tie ĉi; certe li transiros, ĉar li ŝuldas al mi dek frankojn.

Ŝi povas bone flegi. — Diru, ĉu vi povas flegi infanojn? — Jes, kompreneble, sinjorino; mi havis mem tri infanojn. — Kie ili estas? — Ili mortis, sinjorino: unu dronis tiun ĉi someron, la alia falis el fenestro, la trian transiris veturilo.

Senatenta profesoro. — Profesoro (kiun oni ĵus prezentis al fraŭlino): Kiel fartas via edzo? — La fraŭlino: Mia edzo? sed mi estas ja fraŭlino! — La profesoro: Ha! Jes! mi forgesis!.. Kredeble, via estimata edzo ankaŭ estas fraŭlo?..

Sur la strato. — Almozulo: Donu, mi petas vin, ion al mi. —

La sinjoro: Bedaŭrinde, mi nenion havas. — La almozulo: Se vi nenion havas, ne promenu sur la strato, sed laboru!

Trankvila morto. — La edzo (antaŭ sia morto): Kara mia edzino, se vi deziras, ke mi mortu trankvile, promesu al mi, ke vi post mia morto ne fariĝos edzino de Francisko. — La edzino: Nu, vi povas morti tute trankvile, mia kara edzo, ĉar mi jam promesis min al Georgo.

Milionulo. — En Parizo du milionuloj promenas en unu el novaj kvartaloj de l' urbo, interparolante. Subite unu el ili diras:

— Kiom multe kostas nun unu kvadrata metro da tiu ĉi tero. Sed mi bone memoras, ke antaŭ 30 jaroj oni povis aĉeti ĝin, paginte nur la prezon de unu paro da botoj!

— Kial do vi ne faris tion ĉi? — demandas la alia.

— Ha, tiam mi pli bezonis botojn.

En balo. — La juna sinjoro: Kara fraŭlino, vi estas la stelo de l' vespero. — La fraŭlino: Vi estas la unua, kiu tion ĉi diras. — La sinjoro: Permesu do, ke mi, kiel eltrovinto, donu al tiu ĉi stelo mian nomon..

Leono kaj tigro. — En Budapeŝto, kiel preskaŭ en ĉiu granda urbo de Hungarujo, sur anguloj de stratoj ordinare staras homoj, nomataj en la hungara lingvo *hordár*, kiujn oni povas dungi por diversaj laboroj aŭ servoj.

Unu tagon alvenas al tia *hordár* ia sinjoro kaj diras:

Hordár, ĉu vi volas ricevadi dek kronojn ĉiutage dum kelka tempo?

— Jes, via sinjora moŝto, — respondas la *hordár*. — Kaj kion mi devos fari?

— Preskaŭ nenion.

— ?

— Mi estas mastro de sovaĝbestejo.

— ??

— Mia leono hieraŭ mortis.

— ???

— Vi anstataŭos ĝin. Vi vestos sur vin ĝian felon kaj dum la tuta tago vi promenados en la kaĝo, prezentante la leonon.

La hordár akceptas la proponon kaj en tiu sama tago komencas sian „laboradon“.

Jam dum unu horo li trankvile promenis en sia kaĝo, kiam subite okazis io terura, neatendita. Oni ekzasis en tiun saman kaĝon tigron. La hordár-leono ekkriis per homa voĉo, ektiminte terure la minacantan morton. Sed kio okazis?.. La tigo aliras al li kaj mal-laŭte diras en lian oreilon:

— Ne timu, kolego, mi ankaŭ estas hordár.

III. Versaĵoj kaj rakontoj.

Sonĝo.

De M. Lermontov.

En valo Dagestana, dum varmhoru,
Senmova kuŝis mi kun brusta vundo;
Fluigis sangajn gutojn mia koro,
Kaj fumiĝadis plumbo en profundo.

Kaj kuŝis sola mi sur sabl' brulanta;
Malvaste ŝtonaj montoj ĉirkaŭ staris,
Bruligis flavajn suprojn sun' brilanta
Kaj min,— sed dormo min malviva
faris.

Kaj sonĝis mi brilantan per fajretoj
Festenon dum vesper' en land' loganta;
Junular', kronita per floretoj,
Pri mi parolis gaje kaj ĝojante.

Sed, kun aliaj ne paroladante,
Revanta unu junulino estis,

Animo sia, kun sopir' sonĝante,
En mond' malgaja ial longe restis.
En valo Dagestana sur mem fundo, —
Ŝi sonĝis, —kuŝis malvivul' konata,
En lia brusto estis nigra vundo, Kaj
malvarmiĝis flu' de sang' verŝata...

Pino.

De M. Lermontov.

En nordo sovaĝa, sur nuda supraĵo
Balancas sin sola la pino
Kaj dormas, vestita en neĝ' ŝutiganta,
Kaj sonĝas pri sia fratino.
Ĝi sonĝas, ke ploras sur monta krutaĵo.
En lando de l' suna suriro,
En fremda dezerto kun sablo brulanta
La palmo belega je miro.

Ondoj kaj homoj.

De M. Lermontov.

Ondoj ruliĝas, post unu — alia,
Brue kaj surde plaŭdante;
Homoj pasadas kun celo nenia,
Homojn aliajn sekvante.
Ondojn malvarm', libereco pli tiras
Ol sudradioj plej ĉarmaj;
Homoj animojn varmiĝi deziras...
Ondoj sed estas pli varmaj!

Dikulo kaj maldikulo.

De Ant. Ĉeŝov.

En la stacidomo de la fervojo
Nikolajevskaja renkontiĝis du amikoj:
unu — dika, dua — maldika. La dikulo
ĵus finis tagmanĝi en la stacidomo, kaj
liaj lipoj, kun tavolo de butero, brilis
kiel maturaj ĉerizoj. De li iris odoro de
ĥereso kaj de fleur-d'orange. La
maldikulo ĵus eliris el vagono kaj estis
surŝarĝita per valizoj, pakajoj kaj

kartonaj skatoloj. De li irisodoro de ŝinko kaj de kafa densaĵo. Post lia dorso rigardadis malgraseta virino kun longa mentono — lia edzino kaj alta gimnazio kun fermetita okulo — lia filo.

Porfirij! — ekkriis la dikulo, ekvidinte la maldikulon. — Ĉu tio estas vi? Kara mia! Kiom da vintroj, kiom da someroj ni ne intervidis!

Patroj miaj! — ekmiregis la maldikulo. — Miŝa! Amiko de infaneco! De kie vi aperis?

La amikoj trifoje sin kisis reciproke kaj direktis — unu en la alian — la okulojn, plenajn de larmoj. Ambaŭ estis agrable frapitaj de miro.

— Kara mia! — komencis la maldikulo post la kisado. — Jen, mi ne atendis! jen estas surprizo! Nu, rigardu do min bone! Same tia belulo, kia estis! Same tia ĉarmetulo kaj dando! Ha, mia Dio! Nu, kiel do vi vivas? Ĉu estas vi riĉa? Edziĝinta? Mi estas jam edziĝinta, kiel vi vidas... Tio ĉi jen estas mia edzino, Luizo, naskita Vancenbaĥ... luteranino... kaj tio ĉi estas filo mia, Nafanailo, lernanto de III klaso. Tio ĉi, Nafaĉjo, estas amiko de mia infaneco! En la gimnazio ni kune lernis!

Nafanailo iom pensis kaj forprenis de la kapo ĉapon.

— En la gimnazio ni kune lernis! — daŭrigis la maldikulo. — Ĉu vi memoras, kiel vin oni incitadis? Vin oni incitadis, nomante Herostrato — tial, ke vi lernejan libreton per cigareto trabrulis, kaj min Efialto — tial, ke mi kalumnii amis. Ho-ho... Infanoj estis ni! Ne timu, Nafaĉjo! Aliru al li pli proksime... Kaj tio ĉi estas mia edzino, naskita Vancenbaĥ... luteranino.

Nafanailo iom pensis kaj kaŝiĝis post la dorso de la patro.

— Nu, kiel vi vivas, amiko? — demandis la dikulo, rave rigardante la amikon. — Ĉu vi servas ie? Ĉu vi atingis ian rangon?

— Jes, mi servas, kara mia! Mi estas kolegia asessoro jam la duan jaron kaj havas Stanislav'on. — Salajro estas malbona... nu, tio do ne estas grava! Edzino mia lecionojn de muziko donas, mi cigarujojn private faras el ligno. Bonegaj cigarujoj! Po unu rublo mi ilin vendas. Se iu prenas dekon kaj pli, por tiu estas rabato. Iel ni povas vivi. Mi servis en departamento, kaj nun mi estas tien ĉi difinita kiel tablestro en tiu sama ofico... Tie ĉi mi servados. Nu, kiaj do estas viaj aferoj? Kredeble, vi estas jam ŝtata konsilisto? Ha?

— Ne, kara mia, levu pli alten, — diris la dikulo. — Mi jam ĝis sekreta konsilisto atingis... Mi havas du ordenajn stelojn.

La maldikulo subite paliĝis, ŝtoniĝis, sed baldaŭ lia vizaĝo kurbiĝis en ĉiujn flankojn per larĝega rideto; ŝajnis, kvazaŭ de lia vizaĝo kaj okuloj ekŝutiĝis fajreroj. Mem li kuntiriĝis, ĝibiĝis, mallarĝiĝis... Liaj valizoj, pakaĵoj kaj kartonaj skatoloj kuntiriĝis, sulkiĝis... La longa mentono de la edzino fariĝis ankoraŭ pli longa; Nafanailo eltiris sin fronte kaj butonumis ĉiujn butonetojn de sia uniformo...

— Mi, via ekscelenco... Tre agrable! La amiko, oni povas diri, de infaneco... kaj jen fariĝis tia grand-sinjoro! ĥi-ĥi-ĥi.

— Nu, lasu! — sulkiĝis la dikulo. — Por kio estas tiu ĉi tono? Ni kun vi estas amikoj de infaneco — kaj por kio tie ĉi estas tiu rangrespekto!

— Ho, pardonu... kiel do vi... —
ek-ĥi-ĥi-is*) la maldikulo, ankoraŭ
pli kuntiriĝante. — Favora atento de
via ekscelenco... kvazaŭ viviga
akvo... Tio ĉi jen, via ekscelenco, estas
filo mia Nafanailo... edzino Luizo,
luteranino, iamaniere...

La dikulo deziris kontraŭdiri ion,
sed sur la vizaĝo de la maldikulo estis
skribite tiom da estimego, dolĉeco kaj
respekta acideco, ke al la sekreta
konsilisto fariĝis naŭze. Li sin deturnis
de la maldikulo kaj donis al li por
adiaŭo sian manon.

La maldikulo premis tri fingrojn,
kliniĝis, salutante, per la tuta korpo kaj
ek-ĥi-ĥi-is, kiel ĥino: „ĥi-ĥi-ĥi“. La
edzino ekridetis. Nafanailo ekŝovis la
piedon kaj faligis la ĉapon. Ĉiuj tri
estis agrable frapitaj de miro.

La rompita vazo.

De Apufĥin.

La vazon, kie staris floro delikata,
Vi senatente puŝis per la ventumilo.
Sed ĝia fend' ne estis rimarkata.
Dum longa temp' ĝi staris kun trankvilo.

La infanaĵo tute forgesiĝis,
Sed vazo estas de mizero minacita,
La floro velkis, akvo jam foriĝis—
Ne tuŝu: estas ĝi rompita.
Vi same altuŝetis mian koron
Per via mano, kara kaj amata,
De tiam sentas mi en ĝi doloron,
Ŝajnigan, ke mi estas ofendata.
Ĝi same batas tamen kaj vivadas,
De ĉiuj estas la sufero elkaŝita,
Sed vundo pligrandiĝas kaj kres-
kadas—
Ne tuŝu: estas ĝi rompita.

*) Захихикаль.

Serenado el „Don-Juan“.

De grafo Aleksej Tolstoj.

De la ora Alpuĥaro
Estingiĝas rand' ĉiela,
Al voksonoj de gitaro
Vi eliru, mia bela!
Kiuj diros, ke alia
Povas nur kun vi egali,
Ĉiujn mi, pro am' pasia,
Vokas por ĝis mort' batali!
Ruĝiĝis ĉielo
De l'luna radi',
Niseto, anĝelo,
Eliru al mi!
De Seviljo ĝis Grenado,
En mallumo nokta rava,
Ĉie sonas serenado,
Sonas ĉie frapo glava;
Kun kantad' pri belulinoj,
Sangverŝante oni mortas—
Al plej bela el virinoj
Mi do mian vivon portas!
Jam brulas ĉielo
De l'luna radi',
Niseto, anĝelo,
Eliru al mi!

Sonĝo.

(El la tempo de l'Pariza Komuno).

Memkontenta kuŝiĝis dormi la
regna prokuroro. Per la hodiaŭa parol-
ado li plenumis sian devon. Morgaŭ
oni parolos sole pri li. La gazetoj de
„ordo“ superŝutados lin per laŭdo kaj
komplimentoj... Apenaŭ li lasis la
tribunon, ĉirkaŭ li oni komencis
kunvenadi: unuj gratuladis, aliaj
premadis la manon. Li tion ĉi meritis!
Kiel vive pentris li la Internacionalon!
Kiel trafe priskribis li la profund-
egaĵon, en kiun trempiĝas la societo...
Kaj kia logiko! kia fajro en esprimoj!

kiaj konkludoj! Per unu ekbato li forhakis ĉiujn sep kapojn de l' monstro kaj nun povas trankvile dormi!

Li dormiĝis. En la sonĝo li aŭdas ies voĉon: „Brave! vi belege paroladis“. Respondante al tio ĉi, la oratoro ĝentile diris: „ĉu ne vere?“ kaj ekrigardis ĉirkaŭ si, sed neniun rimarkis.

La voĉo ne kvietiĝis: — „Al mi tio ĉi estas konata. Mi estis en tia sama stato. Mi devis ankaŭ savi la ordon, proprajon, familion, religion, patrujon. Mi ne malrapidis. Mi havis aferon kun tiaj samaj mizeruloj. Tio estis societo, kreita de unu homo el la homoj de popolo. Kaj kion nur ili volis! Ĉion ili neigis: patrujon — ni ĝin ne havas, diras ili; familion — apenaŭ ili konfesadis la edzecon; kastojn kaj klasojn — ĉiuj homoj estas egalaj; proprajon — ili postulis, ke riĉuloj dividu sian havaĵon inter malriĉuloj“...

— Brave! Vi estas prava! Vi parolas pri la Internaciano! — ekkriis la reprezentanto de l' administracio.

— Ne, — diris la voĉo. — Sed lasu min fini. Ĉu povis ni toleri tian societeton? Tio ĉi estis neebla. Ni estas amikoj de libereco, ni estas toleremaj al ĉiaj religioj, ĉiaj opinioj, moroj, societoj. Sed tio estis ne societo, sed konspiro. Kio okazos kun la armeo, se por ĝi patrujo estos malplena sono?! Kio estos kun la tuta societo, kiam la edzeco estos malestimata?! Longan tempon ili estis liberaj. Ilia agitado ne estis persekutata. Kiam do oni komencis ilin persekuti? En kia momento de l' reĝado de Nerono? Nur tiam, kiam ili bruligis Romon. Tio estis terura brulego! Ĉiuj partoj de l' urbo estis en flamo! Ili ne volis konfesi, rifuzadis, sed vane...

— Certe, vane ili rifuzas: ili bruligis Parizon.

— Romon, sed ne Parizon. Mi volas al vi pruvi. Post kiam mi ordonis persekuti ilin, dufoje brulis mia palaco. Ĉu tio ĉi estas okazo?

— Via palaco en Burĝo, jes?.. mi rememoriĝas.

— Ne, ne! En Nikomedio... Teruraj estis tiuj ĉi homoj. En la tuta lando ili formis multon da malgrandaj komunoj. Kaj kia organizacio! ŝajnis, ke la komunoj estas sendependaj unu de alia, sed en efektivo tio estis agitado universala, planokonforma...

— La sekcioj de l' Internaciano...

— Ne, la religiaj asociacioj... Adeptoj iliaj ĉiuj estis homoj de simpla stato...

— Jes, jes, ia bindisto...

— Ne, la fiŝisto.

— Ĉu Varlen?

— Petro oni nomis lin. Tio estis homoj el laborista klaso. Ili sendadis emisarojn en ĉiujn landojn de l' mondo...

— Jes, por ekzemplo — Tolen'on...

— Ne, Paulon. Ili estis ruzaj; ĉion ili ekspluatadis por sia celo.

— Tiel, kooperativaj ligoj...

— Ne, misteraĵoj... Unuvorte, tio estis la plej danĝeraj homoj. Sed plej rimarkinde estas, ke ili mortadis heroe, malkaŝeme konfesadis sian religion, iris al loko de ekzekuto ne falante, la plenumon de ekzekuto renkontadis trankvile, sen ia timo.

— Tio ĉi estas vera: Millier, Djuval...

— Ne, tio estis tute aliaj nomoj; precipe rimarkindaj estis virinoj.

— Bruligantinoj, petrolistinoj...

— Mi ne komprenas vin... Se vi ne ĉesos min interrompadi, mi silentiĝos... Iliaj estroj estis abomenaj demagogoj. Mi rememoriĝas pri unu, pri kiu oni parolis, ke li instigadis la popolon al mortigo de la reprezentanto de 1' sociala administracio...

— De 1'generalo Lekont?..

— Ne, de 1'prefekto Orest... Li estis danĝera demagogo...

— Tio estas Raul Rigo!...

— Tio estis la konata Cirilo, sankta Cirilo, kiel lin oni nomis. Li mortigis la instruitulinon Ipation. Kaj tio ĉi estas ankoraŭ ne ĉio. Kvankam okazadis inter ili ankaŭ instruituloj, tamen ili forbruligis la bibliotekon pro la malamo al klereco.

— En Luvro?

— Ne, en Aleksandrio. Tial mi devis energie komenci. Mi uzis unu tre utilan rimedon — haki. Tio ĉi estas same tio, kion ankaŭ vi rekomendas... Mi estas konvinkita, ke miaj ordonoj estis plenumataj, kaj ke nun ekzistas neniu el tiuj ĉi konspiranoj. Nenio tiel bone efikas, kiel rapida puno kaj rapida juĝo.

— Bonege! — ekkriis la regna prokuroro,— vi veron diris. Kvankam mi ne tute komprenas, pri kio vi parolas (vi uzas strangajn vortojn), sed en ĉefo mi tute konsentas kun vi. La ordo — tio estas mia kaj via religio. Laŭdo estu al vi, kara frato! Sed kiu estas vi?

— Mi estas a imperiestro Diokletiano...

— La imperiestro Diokl... La mal-amiko de la religio! La persekutinto de 1'kristanoj! Pri kiu do vi parolis?

Pri la kristanoj...

Ploro kaj rido.

De V. N. Devjatnin.

(Originale verkita en Esperanto).

Se iu ploras senespere,

En tiu sama temp' ni vidas

Alian, kiu tre sincere

En ĝojo granda gaje ridas...

Pro kio? Ĉar al lia koro

Nenion diras fremda ploro...

Formortis ia laboristo,

Kaj ploras lia familio,

Sopiras, ĝemas... Sed ĉerkisto

Tre gaja estas nur de tio...

Pro kio? Ĉar de tiu morto

Al li profiton donas sorto.

Mi servis... Oni min forpelis,

Kaj jen mi estas almozulo!..

Sed li al mia loko celis,

Kaj ĝojas mia proksimulo...

Pro kio? Ĉar por lia koro

Utila estas mia ploro.

Malsobra diboĉulo ia

Forperdis monon... Jen li sidas

Ploranta, sed amiko lia,

De li amata, ĝoje ridas...

Pro kio? Estas li feliĉa:

Fariĝis iom li pli riĉa!..

Jen kudristino laborema,

Plorante, en malĝojo sidas, —

Sed maljunulo voluptema,

Ŝin aĉetinta, gaje ridas...

Pro kio? Ĉar al lia koro

Agrabla estas ŝia ploro.

Riĉulo ploras en malforto:

Malsano ŝarĝa lin turmentas,

Minacas lin kruela morto...

Sed iu ridas kaj kontentas...

Pro kio? Ĉar riĉula ploro

Profiton donas al doktoro.

Apenaŭ viva, lama, blinda,

Ploranta ia ĉifonulo

Sendube estas kompatinda, —

Sed ridas grava kortegulo...

Pro kio? Ĉar al nobla koro
 Ridinda estas fremda ploro.
 Poet' priskribas vivon nian,
 Plorante ĝin el tuta koro, —
 Kaj, ekaŭdinte ploron lian,
 Tre gaje ridas redaktoro...
 Pro kio? Ĉar de lia ploro
 Profiton havos redaktoro.
 Ridindaj estas homa ploro,
 De vivo ŝarĝa premo,
 Sopir', malĝojo kaj doloro,
 Ĉagren', mizero, ĝemo...
 Pro kio? Ĉar al nia koro
 Nenion diras fremda ploro.

Rido.

De Leonid Andrejev.

I.

En la duono de sepa horo mi estis certigita, ke ŝi venos, kaj al mi estis treege gaje. Mantelo mia estis butonumita per sola supra hoketo kaj disbloviĝadis de malvarma vento, sed malvarmon mi ne sentis; kapo mia estis fiere klinita malantaŭen, kaj la studenta ĉapo sidis tute sur la nuko; okuloj miaj, rilate al renkontiĝantaj viroj, esprimadis favoron kaj bravecon, rilate al virinoj elvokon kaj afablecon: kvankam jam kvar tagojn mi amis solan ŝin, sed mi estis tiel juna, kaj koro mia estis tiel riĉa, ke resti tute indiferenta al aliaj virinoj mi ne povis. Kaj paŝoj miaj estis rapidaj, kuraĝaj, flirtantaj.

En sen kvarono sep horoj mantelo mia estis butonumita per du butonoj, kaj mi rigardis nur virinojn, jam sen elvoko kaj afableco, sed — pli precize — kun abomeno. Mi bezonis nur unu virinon — ceteraj povis renversiĝi al diablo: ili nur malhelpadis kaj per sia ŝajna simileco al si aldonadis

al miaj movoj senfidecon kaj akran nekonstantecon.

En sen kvin minutoj sep al mi fariĝis varmege.

En sen du minutoj sep al mi fariĝis malvarme.

Ĝuste en sep horoj mi konvinkiĝis, ke ŝi ne venos.

En la duono de la naŭa horo mi estis la plej mizera ekzistaĵo en la mondo. La mantelo estis butonumita per ĉiuj butonoj, la kolumo — levita, kaj la ĉapo — surŝovita sur la bluiĝintan nazon; la haroj sur tempioj, kaj la lipharoj kaj okulharoj blankiĝis de prujno, kaj la dentoj iom interfrapadis. Pro piedtiranta irado kaj fleksita dorso min oni povis opinii sufiĉe ankoraŭ vigla maljunulo, reiranta el gastado en rifuĝejon.

Kaj ĉion tion ĉi faris — ŝi! Ho, diabl... ne, ne decas: povas esti, ke ŝin oni ne lasis, aŭ ŝi estas malsana, aŭ mortis. Mortis! — kaj mi insultas.

II.

— Tie hodiaŭ estas ankaŭ Eŭgenia Nikolajevna, — diris al mi kolego, studento, sen a kaŝita penso: li ne povis scii, ke mi atendis Eŭgenia'n Nikolajevna'n en la frosto de sep horoj ĝis la duono de la naŭa.

— Jen kiel! — profundpense respondis mi, sed en la animo elsaltis: ho, diabl...

Tie — tio ĉi estas en la vesperbalo ĉe Polozov'oj. Polozov'oj estas homoj, ĉe kiuj mi neniam estadis. Sed hodiaŭ mi tie estos.

— Sinjoroj! — gaje ekkriis mi. — Hodiaŭ estas Kristnasko; hodiaŭ ĉiuj gajas — gaju ankaŭ ni.

— Sed kiel? — malgaje diris unu.

— Sed kie? — aldonis alia.

— Ni maskiĝu kaj veturadu en ĉiujn vesperbalojn, — decidis mi.

Kaj al ili, tiuj ĉi sensentaj homoj, efektive fariĝis gaje. Ili kriadis, saltadis kaj kantadis. Ili dankadis min kaj kalkuladis la kvanton da kontanta mono. Kaj post unu duonhoro ni varbadis en la tuta urbo ĉiujn solajn, ĉiujn enuantajn studentojn, kaj kiam ni estis en la kvanto da dek gaje saltantaj diabloj, ni veturis en frizejon, — ĝi estas ankaŭ kostumejo, — kaj plenigis ĝin per malvarmo, juneco kaj rido.

Mi bezonis ion malluman, belan, kun nuanco de bela malgajeco, kaj mi petis:

— Donu al mi kostumon de hispana nobelo.

Kredeble, tio ĉi estis tre longa nobelo, ĉar en lia vesto mi kaŝiĝis tuta sen resto kaj eksentis min jam tute sola, kvazaŭ en vasta kaj senhoma salono. Elirinte el la kostumo, mi petis ion alian.

— Ĉu eble vi volas arlekenon? Multkolora kun tintiletoj.

— Arlekenon! — kun malestimo ekkriis mi.

— Nu banditon. — Tia ĉapelo kaj ponardo.

Ponardo! — tio ĉi estas konforma kun miaj intencoj. Bedaŭrinde, la bandito, kies veston oni donis al mi, malcerte atingis plenaĝon. Plej kred-eble, tio ĉi estis malvirtigiĝinta bubo en la aĝo, proksima al ok jaroj. Lia ĉapeleto ne kovris mian nukon, kaj el veluraj pantalonoj min oni devis eltiri, kvazaŭ el kaptilo. Paĝio ne taŭgis — li estis tuta en makuloj, kvazaŭ tigro. Monaĥo estis plena de truoj.

— Kio do vi? Malfrue estas! — rapidigis min la vestintaj jam sin kolegoj. Restis sola kostumo — de nobelohino.

— Donu ĥinon! — eksvingis mi per la mano, kaj al mi oni donis ĥinon. Tio ĉi estis — diablo scias — kio! Mi ne parolas jam pri la mem kostumo. Mi silentas pri iaj idiotaj koloraj botoj, kiuj estis por mi malgrandaj, eniris duone kaj en alia sia, la plej esenca parto staris en formo de du nekomprenblaj aldonoj sur ambaŭ flankoj de piedo. Silentos mi ankaŭ pri rozkolora ĉifono, kiu kovris mian kapon anstataŭ peruko kaj estis alligata per fadenoj al oreloj, kiuj pro tio ĉi leviĝis kaj stariĝis, kiel ĉe vesperto.

— Sed la masko!

Tio ĉi estis, se oni povas tiel sin esprimi, abstrakta fizionomio. Ĝi havis nazon, okulojn kaj buŝon, kaj ĉio tio ĉi estis regula, staranta sur sia loko, sed en ĝi estis nenio homa. Homo eĉ en ĉerko ne povas esti tiel trankvila. Ĝi esprimadis nek malgajecon, nek gajecon, nek miregon — ĝi absolute nenion esprimadis. Ĝi rigardadis vin rekte kaj trankvile — kaj nedetenebla rideo ekposedadis vin. Kolegoj miaj ruliĝadis de rido sur kanapoj, senforte faladis sur seĝojn kaj svingadis per manoj. Tio ĉi estos la plej originala masko, — parolis ili. Mi apenaŭ ne ploris, sed kiam mi ekrigardis en spegulon, la rido ekposedis ankaŭ min. Jes, tio ĉi estos la plej originala masko.

— En nenia okazo ni forprenu de l'vizaĝoj la maskojn, — interkonsentadis la kolegoj dum la vojo. — Ni donu ĵuran parolon.

— Parolon! Parolon!..

III.

Absolute, tio ĉi estis la plej originala masko. Post mi oni iradis en tutaj amasoj, turnadis min, puŝadis, pinĉadis — kaj kiam, turmentita, mi kun kolero min turnadis al persekut-

antoj — nedetenebla ridego ekposedadis ilin. Dum la tuta vojo min ĉirkaŭadis kaj premadis brueganta nubo de ridego, kaj moviĝadis kune kun mi, kaj mi ne povis elŝiriĝi el tiu ĉi ringo de freneza gajado. Kelkajn minutojn ĝi kaptadis ankaŭ min: mi kriadis, kantadis, kaj la tuta mondo sin turnadis en miaj okuloj, kiel malsobra. Kaj kiel ĝi estis malproksima de mi, tiu ĉi mondo! Kaj kiel sola mi estis sub tiu ĉi masko!

Fine, min oni lasis en trankvileco. Kun kolero kaj timo, kun malico kaj delikateco mi ekrigardis ŝin kaj diris:

— Tio ĉi estas mi.

La densaj okulharoj malrapide kaj kun miro leviĝis, la tuta garbo de nigraj radioj ekŝprucis sur min — kaj rido, sonora, gaja, hela, kiel la printempa suno, rido respondis al mi.

— Jes, tio ĉi estas mi. Tio ĉi estas mi! — ripetadis mi, kaj ridetadis. — Kial vi ne venis hodiaŭ?

Sed ŝi ridis. Gaje ridis.

— Mi tiel suferis. Tiel eldoloris la koro, — petegis mi respondon.

Sed ŝi ridis. La nigra brilo de ŝiaj okuloj estingiĝis, kaj — pli kaj pli hele — disbruliĝadis la rideto. Tio ĉi estis suno, sed suno brula, senindulga, kruela.

— Kio estas al vi?

— Tio ĉi estas vi? — diris ŝi, sin detenante. — Kia vi estas... ridinda! — Ŝultroj miaj malleviĝis, kaj la kapo malleviĝis, kaj tiel multe da malespero estis en mia pozo. Kaj dum ŝi, kun estingiĝanta lumo de la rideto sur la vizaĝo, rigardis la kurantajn rapide preter ni junajn parojn, mi parolis:

— Hontinde estas ridi. ĉu post mia ridinda masko vi ne sentas vivan suferantan vizaĝon — ja nur por vidi vin mi vestis ĝin. Vi donis al mi esperon pri

via amo, kaj tiel rapide, tiel kruuele vi forprenas ĝin. Kial vi ne venis?

Rapide, kun rediro sur la ĉarma ridetanta buŝo ŝi turniĝis al mi — kaj kruela rido potencege ekposedis Sin. Sufokiĝante, preskaŭ plorante, kovrante la vizaĝon per punta parfuma tuketo, Si malfacile diris:

— Ekrigardu... vin mem. Malantaŭe en la spegulon... Ho, kia estas vi!..

Kunmovante la brovojn, kunpremante de l' doloro la dentojn, kun la malvarmiĝinta vizaĝo, de kiu forfluis sango, mi ekrigardis en la spegulon, — min rigardis idiote-trankvila, neŝanceleble indifera, nehome senmova fizionomio. Kaj mi... mi ekridis. Kaj kun nemalvarmiĝinta ankoraŭ rido, sed jam kun tremo de komenciĝanta kolero, kun frenezeco de malespero, mi ekparolis, preskaŭ ekkriis:

— Vi ne devas ridi!

Kaj kiam ŝi trankviliĝis, mi daŭrigis murmurete paroli pri mia amo. Kaj neniam mi parolis tiel bone, tial, ke neniam mi amis tiel forte. Pri turmentoj de atendado, pri venenaj larmoj de freneza ĵaluzo kaj sopiro, pri mia animo, kie ĉio estis amo, mi parolis. Kaj mi vidis, kiel, malleviĝante, ĵetis la okulharoj densan ombron sur la paliĝintajn vangojn. Mi vidis, kiel tra ilia malbrila blankeco ĵetadis ruĝan relumon la ekflaminta fajro, kaj kiel la tuta fleksebla korpo senvole kliniĝadis al mi. Ŝi estis vestita kiel diino de nokto kaj — tuta enigma — kvazaŭ per nebulo, vestita per nigra punto, brilanta per brilantoj de steloj, estis bela, kiel forgesita sonĝo de l' malproksima infaneco. Mi parolis — kaj larmoj surboladis sur miaj okuloj, kaj ĝoje batadis la koro. Kaj mi ekvidis, ekvidis, fine, kiel ĉarma, kompatanta

rideto malfermis ŝian buŝon, kaj, ekstremitate, leviĝis la okulharoj. Malrapide, timeme, kun senfina konfido turnis ŝi al mi la kapeton, kaj...

Tian ridon mi ankoraŭ ne aŭdis!

— Ne, ne, mi ne povas... — preskaŭ ĝemadis ŝi kaj, klininte malantaŭen la kapon, ree elpafadis per sonora kaskado de rido.

Ho, se al mi nur por unu minuto oni donus homan vizaĝon! Mi mordadis la lipojn, larmoj fluadis sur mia varmegiĝinta vizaĝo, sed ĝi, tiu ĉi idiota fizionomio, en kiu ĉio estis regula, la nazo, okuloj kaj lipoj, rigardis kun neŝanceble terura — en sia senceco — indiferenteco. Kaj kiam, lamante sur miaj koloraj piedoj, mi foriris, ĝis mi longe ankoraŭ sin alportadis la sonora rido: kvazaŭ de grandega altaĵo faladis arĝentkolora flueto de akvo kaj kun gaja kantado disbatiĝadis apud malmola ŝtonego.

IV.

Disŝutiĝinte sur la tuta dormanta strato, ekante la noktan mallaŭtecon per viglaj, ekscititaj voĉoj. ni iris hejmen, kaj kolego al mi parolis:

— Vi havis kolosan sukceson. Mi neniam vidis, ke oni tiel ridus... Atendu, kion vi faras? Kial vi ŝiras la maskon? Fratetoj, li freneziĝis! Rigardu, li disŝiras sian kostumon! Li ploras!!

„Al feliĉo!..“

De **lv. Naĵivin.**

„Al feliĉo!..“ staris per grandaj, nigraj literoj sur ruĝa afiŝo, kiu estis vidata sur kolono por anoncoj. „Al feliĉo!.. Al feliĉo!..“ kriadis muroj de

domoj, baroj, akre multkoloriĝante per ruĝaj kvadrataj folioj de papero. „Al feliĉo!.. Al feliĉo!..“ per sonoraj voĉoj kriadis knaboj-ĉifonuloj, disĵetante sur stratoj kaj disdonante al pasantoj ruĝajn anoncojn pri konferenco, kiun devis doni en la vespero de tiu ĉi tago en unu el fermitaj preĝejoj de la urbo konata pensulo-protestanto, unu el apostoloj de nova, pli bona vivo... Kaj homoj aŭskultadis kriojn-alkvokojn de buboj kaj, haltinte, longe staradis antaŭ ruĝaj afiŝoj, kvazaŭ hipnotigitaj per iliaj parolantaj literoj, kaj en animoj de ili flugadis iaj neklaraj, sed des pli belaj revoj, ekfloradis ree la velkintaj jam en la senpluveco de la vivo esperoj... Kvazaŭ ia sorĉa miraĵo*) ekludis subite super malgaja, senfrukta dezerto de ilia senanimigita vivo, kaj ili estis allogataj malproksimen — al feliĉo...

Kaj jen, kiam malnova sonorilo de malnova preĝejo kun malrapidema graveco kaj ia reva malgajeco trabatis ok horojn, de ĉiuj finoj de la urbo, sur mallumaj, kurbaj kaj mallarĝaj stratetoj, sub malvarma aŭtuna pluvo ekiris homoj — ĉiuj en la saman lokon, tien, kie al ili oni parolos pri feliĉo... Iris maljunaj kaj junaj, virinoj kaj viroj, junuloj, junulinoj kaj eĉ infanoj, iris malriĉaj kaj riĉaj, bonaj kaj malbonaj, sed la plej multe iris homoj en ŝiritaj, malpuraj vestoj, kun maldelikataj, palaj manoj kaj sigelo de ĉiama zorgado sur vizaĝoj... kaj ĉiuj ili rapidis, unu antaŭ alia, kvazaŭ timante ellasi la atendantan ilin ie feliĉon...

Enkaptita de la humoro de tiuj ĉi rapidantaj, mallumaj figuroj, rapidigis miajn paŝojn ankaŭ mi...

*) Ŝajna vidaĵo, fantomo, aperanta ofte antaŭ okuloj de vojaĝantoj en dezertoj.

En la malnova preĝejo, plena de bruo de voĉoj kaj ŝovado de centoj da piedoj sur ŝto-naj, defrotitaj platoj, estis lume, seke kaj varme, kaj malvarmigintaj, malsekiĝintaj homoj vigliĝis, viviĝis kaj, sidiĝinte sur malnovaj, mordetitaj de vermoj benkoj, senpacience atendis, kiam al ili oni parolos pri feliĉo. Ĉirkaŭ ili, forirante supren, en mallumon, ŝarĝe leviĝadis malafablaj ŝtonaj muroj, aŭdadintaj dum jarcentoj multajn — ho, kiom multajn! — preĝojn de homoj pri feliĉo, kaj, tial, indiferentaj al tiu ĉi ekscitita amaso. Sed homoj turnadis al ilia severa, kvazaŭ ion mallaŭdanta, silento, nenian atenton...

Jen antaŭe, super katedro, tie, kie ĝis tiam staris altaro, hele ekflamis lumo; sur la antaŭaj kaj, post ili, ankaŭ sur ĉiuj ceteraj benkoj akre ekkrakis aplaŭdoj, kaj sur la katedron suriris maldika, alta maljunulo kun bona vizaĝo.

Bruo de homoj iom post iom, sed rapide, ĉesiĝis, kaj en la streĉita, atendanta mallaŭteco de la malnova preĝejo aŭdiĝis maljunula, varmigita de interna varmo, voĉo:

— Amikoj miaj...

Koroj ekremis kaj ekbatis pli varmege...

Kun ekbrulintaj okuloj, haltiginte spiradon,— unuj kun varmega kredo, aliaj kun singardema dubo, — la homoj avido kaptadis ĉiun vorton de la maljunulo. Kaj vortoj de la maljunulo, jen, plenaj de sankta indigno, vipadis en la aero, kiel vipoj, ekzekutante malviviĝintajn korojn, jen, varmigintaj de senfina amo, kiel trunkvilaj anĝeloj sur neĝeblankaj flugiloj, flugadis en la solena silentado de mallumaj arkaĵoj de la malnova preĝejo kaj bruligadis

lumon en la animoj de homoj, pasie avidantaj kaj soifantaj veron.

Kaj min, fremdlandulon, ravadis kaj kortuŝadis ĝis larmoj kaj tiu ĉi voĉo, pasie elŝiriganta el la koro, varmigita de la amo, kaj tiu ĉi senborde libera, kuraĝa penso, brulanta super la amaso, kiel suno.

Kaj la maljunulo parolis jam pri senmorta, mirinda beleco de la mondo, pri neelĉerpeblaj riĉaĵoj de la tero kaj, ree per ventego de indigno kaj malamo renversiĝinte sur la vivon de forgesintaj pri la justeco homoj, kuraĝe detiris malluman kurtenon de l'estonteco kaj— la homoj ekremis.

— Jen, jen estas ĝi — feliĉo!... Ĝi estas via!.. Havu nur kuraĝon etendi la manojn!..

Per fajraj, bruligantaj vortoj la maljunulo pentradis unu post alia blindigantajn pentraĵojn de tiu ĉi estonteco, de tiu ĉi ebla estonteco — jen, jen estas ĝi! — kaj homoj, startintaj, ŝajnis, sur la mem sojlo de tiu ĉi feliĉo, suferis, turmentiĝis, freneze dezirante, freneze sopirante kaj — ne sciante, kiel eniri en la paradizon...

— Jen, jen estas ĝi!.. — pasie ekkriis la maljunulo konkludajn vortojn, etendante al la amaso siajn manojn. — Prenu do!..

Kaj en liaj vortoj estis tiom da forto, tiom da kredo, ke ĉiuj, ĉiuj sen escepto, ekkredis, ke ili tuj, post unu momento, prenos sian feliĉon, kaj rekompencis la profeton per tondro de aplaŭdoj.

Sed pasis unu momento kaj — rapide-rapide! — estingiĝis la kredo kaj — ree ne estas vojo en sorĉan landon!..

— Sed kion do ni devas fari por tio ĉi? — pasie ekbrilis subite el la streĉ-

ita silento de l'amaso juna voĉo. — Kie estas vojo?..

Kaj tiu ĉi voĉo trovis resonon en centoj da homaj, ne povantaj kompreni, koroj — kaj varmega eksplodo de aplaŭdoj substrekis tiun ĉi pasian sopirantan kriion pri helpo, — ĉiuj postulis respondon: kie estas vojo?..

Kaj ree en la streĉita mallaŭteco aŭdiĝis la malakra, maljunula, iranta en la animon voĉo:

— Vojo?.. — diris la maljunulo. — Parolu, kriadu pri malvero, postuladu justecon, ekbruligadu per la fajro de l' vero homajn korojn! Nia celo estas, ke la homoj forgesu turmentojn, faru tiel, ke ilia rido estu pagata per nenies larmoj... Kaj se ni vidas celon de vojo — kion ni bezonas plu? Ni iru!..

Mi aŭdis, kiel en koroj de la homoj leviĝadis malvarma nubo de nekontenteco...

Sed formulon, formulon vi donu al ni! — ree, kiel fulmo, ekbrilis el tiu ĉi nubo la pasia juna voĉo.

— Formulon! Formulon!.. — ekkriis voĉoj, en kiuj estis aŭdata nun la kolero: feliĉo estis antaŭ la okuloj kaj jen ĝi ree forglitas!

— Bruligadi korojn, kriadi — tiel, tio ĉi estas bona! — ĵetadis la nevidebla por mi junulo sopirantajn vortojn. — Sed tio ĉi prenos, povas esti, ankoraŭ jarcentojn, sed ni laciĝis... Diru, kion ni devas fari por atingi tion ĉi tuj? Ni ne povas atendi! Komprenu: ni ne povas!..

— Bataladu!.. — respondis la maljunulo.

La nubo de l' koroj mallumiĝadis... La miraĵo paliĝis, malaperis. Fariĝis malvarme kaj malgaje...

Enkaptita de tiu ĉi malvarmo de disreviĝo, en sopiro mi levis la okul-

ojn, kaj subite malproksime antaŭe, en malluma angulo de la preĝejo, super la kapoj de homoj, mi ekvidis grandan malnovan krucumon, kaj senordigita penso mia haltis sur la Granda Suferinto pro feliĉo de homoj..

Kaj jen — kio estas tio ĉi? — la klinita flanken kapo en prunela krono leviĝis, la estingiĝintaj okuloj eklumiĝis de delikata penso, kaj en malvarma silentado de la disreviĝinta amaso mi ekaŭdis sorĉantan voĉon:

— Serĉadu la Regnon de Dio kaj la veron de ĝi, kaj cetera ĉio aldoniĝos al vi... La Regno do Dia interne de vi estas, — ne serĉu ĝin ekster vi: ĝi estas en viaj koroj. Amu proksimulojn viajn, kiel mem vin, kaj ne nur ne faru al ili tion, kion vi ne volas, ke ĝin oni al vi faru, sed faru, faru al ili tion, kion vi volas, ke oni al vi faru. Serĉadu la Regnon de Dio kaj la veron de ĝi, kaj cetera ĉio — ĉu vi aŭdas? ĉio!... — aldoniĝos al vi... Vi do serĉas jen jam dum la jarcentoj „ĉion ceteran“ kaj nenion trovas kaj — neniam trovos!

Miregigita, mi ekrigardis ĉirkaŭ mi... ĉiuj malgaje silentis...

— Fratoj!.. Aŭskultu Lin!.. — ekkriis mi, eksaltinte kaj montrante la Krucumiton pro homoj. Sed la kapo en la prunela krono ree senvive kliniĝis sur la sangigitan bruston: Li diris ĉi on.

Ĉiuj rigardoj turniĝis al mi...

— Kio?.. Kion li diras? — ekaŭdiĝis de ĉiuj flankoj kolerigitaj voĉoj. — Formulon, formulon al ni donu!.. Pli rapide... Por ni estas tempo por dormi, — morgaŭ ni devas labori... Formulon!..

— Sed ja ĝi delonge jam estas donita al vi! — ekkriis mi...

— Kia? Ni ne scias... Ni forgesis...
Formulon, formulon!.. Pli rapide, — ni iras dormi!..

Kaj unu post alia ili sin levadis de siaj lokoj...

Du horojn parolis tie ĉi homoj pri vivo, pri vero, pri feliĉo, sed la nomo de Dio eĉ unufoje ne estis elparolita de ili, — ili volis aranĝi sian feliĉon sen Dio. Kaj tial, timante esti nekomprenita, mi ne povis decidiĝi ripeti al ili tion, kion diris al mi la voĉo de la kruco.

— Feliĉo estas ne ekster vi, — diris mi, — sed en viaj koroj. Eltiradu ĝin de tie!.. Ĉiu penadu fari sin inda de idealo, kiun li celadas, kaj — feliĉo estos via... Komenci oni devas de si, plej antaŭe de si...

— Formulon!.. Formulon!..

— Agadu kun homoj tiel, kiel vi volas, ke ili agadu kun vi — kun ĉiuj,

sen escepto, homoj, en ĉiuj, sen escepto, okazoj... — diris mi. — Kaj de tiu momento, kiam vi komencos agadi tiel, — feliĉo estos via!..

Konfuza silento estis respondo al mi... Enpensaj, kvazaŭ konfuzitaj de io, homoj silente sin direktis al elirejo: tio, kion mi diris, estis tro malnova, sed ĉefe, tro simpla por esti komprenita kaj akceptita...

Kaj ree ĉiuj eliris en la malvarman mallumon de la nokto. De la nigra, malalta ĉielo, kiel larvoj de malespero, faladis grandaj gutoj de pluvo... En kelkaj lokoj, malforte lumigitaj per pala, malsana lumo de lanternoj, estis vidataj la ruĝaj afiŝoj, alvokantaj homojn al feliĉo, — ili perdis sian koloron sub la pluvo kaj en formo de malbelaj, glujaj ĉifonoj derampadis de la muroj en koton, sub piedojn de homoj...

Практическія свѣдѣнія.

I. Словари и пособия для изучения Эсперанто.

Д-ръ Л. Заменгофъ, „Universala Vortaro“ (Переводъ словъ съ Эсперанто на русскій и др. языки), цѣна 40 коп.

Д-ръ Л. Заменгофъ, „Русско-эсперантскій словарь“, ц. 1 руб.

Д-ръ Л. Заменгофъ, „Ekzercaro“ (сборникъ упражненій), ц. 30 коп.

Вмѣсто отдѣльныхъ изданій „Universala Vortaro“ и „Ekzercaro“ можно пользоваться книгой „Fundamento de Esperanto“, заключающей въ себѣ названныя книжки; цѣна „Fund. de Esp.“ 80 коп. (въ изящномъ переплетѣ 1 р. 20 к.).

„Полный эсперанто-русскій словарь“ подъ ред. А. Сенсаева, изд. „Вѣстника Знанія“, ц. 80 коп., а для

подписч. „В. Зн.“ — при условіи вписыванія прямо черезъ контору „В. Зн.“ — 60 коп.

Paul Boulet, „Du mil novaj vortoj“, ц. 60 коп.

P. Fruictier, „Esperanta Sintakso“, ц. 60 коп.

II. Книги для первоначальнаго чтенія.

Д-ръ Л. Заменгофъ, „Fundamenta Krestomatio“ (лучшіе образцы эсперантскаго стиля), 460 стр., ц. 1 руб. 40 коп.

D-ro K. Bein (Kabe), „Unua Legolibro“, ц. 75 коп.

A. Grabowski, „Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia“ ц. 80 коп.

D-ro K. Bein (Kabe), „Internacia Krestomatio“, ц. 50 коп.

D-ro K. Bein (Kabe), „Elektitaj Fabeloj de fratoj Grim“, ц. 75 к.

III. Книги на русском языкѣ для ознакомленія съ существомъ вопроса о международномъ языкѣ.

„Сущность и будущее идеи международного языка“, переводъ съ Эсперанто Т. П. Щавинскаго, ц. 30 коп.

Н. П. Евстифѣевъ, „Къ вопросу о международномъ языкѣ“, ц. 60 коп.

Н. Кабановъ, „Вспомогательный международный языкъ Эсперанто“, ц. 10 коп.

„Международный языкъ Эсперанто во Французской Палатѣ Депутатовъ“ со вступит. статьей В. И. Лойко, ц. 5 коп.

IV. Литературныя произведенія въ переводахъ на Эсперанто.

Переводы д-ра Л. Заменгофа:

Shakespeare (Ŝekspir’), „Hamleto“, ц. 80 коп.

N. V. Gogol, „La Revizoro“, ц. 60 коп.

Schiller, „La Rabistoj“, ц. 80 коп.

Goethe, „Ifigenio en Taŭrido“, ц. 80 коп.

Переводы другихъ лицъ:

V. Prus, „La Faraono“, trad. de d-ro K. Bein (Kabe), 3 тома по 80 коп.

Moliere, „Don-Ĵuan“, trad. de E. Boiras, ц. 60 коп.

A. S. Puŝkin, „Mocart kaj Saljeri“, trad. de Vs. Lojko, ц. 12 коп.

I. Turgenev, „Versaĵoj en prozo“, trad. de d-ro K. Bein (Kabe), ц. 40 коп.

Выписывать указанные книги можно черезъ контору „Вѣстникъ Знанія“, Спб., Невскій, 147.

*La originalan libron mi skanis, transformis al la teksto kaj repaghigis.
La aspekto, ortografio de la eldono estas laueble konservitaj.*

(c) Maksim Grishin. 2007

Pri la impresoj, proponoj ktp. skribu al mi maksimo@mail.ru